

N. N. 32,  
**Rozbranĉo forĝermadis**  
*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
el trunk' de nobelec'.  
Prauloj jam kantadis:  
de Jišaj ĝia spec'.  
Floretom portis ĝi,  
en akra vintro estis,  
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
Jesaja de profet':  
Maria netuŝita,  
de kiu la floret'.  
Eterne volis Di':  
naskinta infaneton  
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
alvenas bonodor'  
Ĝi brilas en la koro,  
mallumon pelas for.  
Homido, Dia Vort',  
nin el sufero helpas,  
De pek' Savant' kaj mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.*

*Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)*

*Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.*

N. N. 32,  
**A spotless roze is growing**  
*tradukita de N. N. 33*

1. A Spotless Rose is growing,  
Sprung from a tender root,  
Of ancient seers' foreshowing,  
Of Jesse promised fruit;  
Its fairest bud unfolds to light  
Amid the cold, cold winter,  
And in the dark midnight.
2. The Rose which I am singing,  
Whereof Isaiah said,  
Is from its sweet root springing  
In Mary, purest Maid;  
Through God's great love and might  
The Blessed Babe she bare us  
In a cold, cold winter's night.

*Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en la Anglan de N. N. 33.*

*Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://ingebo.org/spiritua/esistein.html>.*